

# ZPRÁVY

## ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU INFORMOJ DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO

Ročník X Číslo 2 (30)

Osvětový ústav v Praze

Říjen 1968

### Z ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU

Prohlašujeme, že plně schvalujeme postup našich vrcholných orgánů státu a KSČ v čele s prezidentem republiky Ludvíkem Svobodou a I. tajemníkem KSČ Alexandrem Dubčekem v současné velmi vážné době pro naši Československou socialistickou republiku a její národy. Chceme bezvýhradně podporovat jejich úsilí o konsolidaci poměrů a další rozvoj demokratického socialismu v duchu akčního programu strany a vlády.

Hodláme pokračovat v naší dosavadní společensky prospěšné, mírové, kulturní a informační činnosti a počítáme s aktivní spoluprací Vás všech. Jsme přesvědčeni, že i v nových podmínkách máme k tomu všechny předpoklady.

Jsme přesvědčeni, že my čs. esperantisté, jako stoupenci mezinárodního dorozumění a mírového hnutí, jsme povinni a máme k tomu předpoklady, abychom uplatňovali mezinárodní jazyk k dalšímu rozvoji kulturních, přátelských styků, na obranu míru a k objektivním informacím o naší republice v zahraničí, zejména v socialistických zemích!

Nenechte se odradit případnými ztíženými podmínkami od plné společenské a kulturní aktivity a rozvíjejte jak interní klubovní činnost, tak i na veřejnosti ve spolupráci s místními veřejnými organizacemi. Snažme se splnit své pracovní plány a přispět podle možností i ke splnění úkolů pracovního plánu ČSEV na rok 1968.

Jako základna nám slouží dosavadní výsledky práce v tomto roce, zejména:

- organizační aktivita ČSEV, mnoha E-kroužků, naší sekce mládeže a některých dalších sekcí, hlavně v souvislosti s přípravami na ustavení samostatného orgánu;
- řada významných a úspěšných větších akcí jako setkání v Poděbradech, v Jablonci, letní kursy SET v Lančově, v Piešťanech, v Prievidzi aj., vesměs s mezinárodní účastí;
- účast našeho delegáta na 53. světovém kongresu UEA v Madridu a na mezinárodních kongresech TEJO (Tarragona) a STELO (Aix-en-Provence), Manon Lescaut v esperantu v nastudování Slezského divadla z Opavy na kulturním festivalu v Jugoslavii a na setkání v Jablonci i mnoho dalších zájezdů našich esperantistů v zahraničí;
- ustavení Slovenské esperantské společnosti při Slovenské akademii věd v Bratislavě (2. 5. 1968);
- brožura O. Kníchala „Co nevíte o esperantu“ — vhodná informační pomůcka zejména pro nové esperantisty, zájemce o kursy i pro pracovníky veřejných institucí a organizací s nimiž přicházíme do styku. (Hromadné objednávky řiďte na

adresu Ústředí mladých esperantistů, Ječná 8, Praha 2);

Jedním z předních úkolů je organizace podzimních kursů esperanta a podchycení všech zájemců. Nezapomínejte na kursy pokračovací tak, aby se absolventi počátečních kursů — jak se často stává — pro hnutí neztráceli. Pamatujte při tom na účastníky letošních letních kursů (Lančov, Pieštany, Prievidza).

### **Organizační řád ČE5**

Návrh organizačního řádu, vypracovaný z pověření předsednictva ČSEV dr. Pumprem, byl po projednání na 2. plénu 18. 5. tr. v Brně a zapracování přijatých připomínek, znovu projednán na shora uvedeném mimořádném zasedání ČSEV a schválen v konečném znění.

### **Organizační řád ČSEF**

Návrh organizačního řádu Československé esperantské federace — po zapracování připomínek ze společné schůze ČSEV a Poradního sboru pro esperanto a esperantské kroužky při Osvětovém ústavu v Bratislavě ze dne 19. 5. tr. v Brně a v úpravě dr. Pumpra — byl rovněž znovu projednán a zaslán současně k dalším připomínkám Poradnímu sboru v Bratislavě, který funguje též jako přípravný výbor pro ustavení „Zvazu esperantistov Slovenska“.

**Zprávy ČSEV** — Ti odběratelé, za které zašlete ještě předplatné ročníku 1968, dostanou při expedici 2. čísla i číslo 1. a navíc (!) zdarma celou kolekci ročníku 1967 (pokud zásoba stačí). Upozorňujeme, že administraci Zpráv 1968 převzala Drahomíra Zdvihalová, ÚME, Ječná 8, Praha 2; na tuto adresu řiďte změny adres a případné reklamace odběratelů.

## **Letero el Finnlando**

„Hazarde mi ricevis — de iu mia sveda amiko — la numeron 1968 de via organo. La Esperantan tekston mi legis kun intereso ... Ĉi-okaze mi rememoras, ke antaŭ unu jaro mi sendis al vi esperantlingvan prospekton de nia urbo. Vi ĝin eble publikigis, ĉar la turisma oficejo ricevis el via lando multajn petojn pri alsendo. La fakto estas tre grava por ni finnoj, ĉar via nacia lingvo estas tute fremda al ni, kaj nia turisma oficejo (neesperantista) mem spertis, ke per Esperanto oni povas kontakti kun aliaj popoloj. Nun la urbo denove presigis prospekton kun nova, pli detala enhavo. Se iu deziras, povas skribi al Turisma Oficejo, Linankatu 8, TURKU, Finnlando.

En via revuo precipe min interesis la noto pri V. I. Lenin kaj Esperanto. Mi estas jam tiom aĝa, ke mi mem renkontis k-don Lenin somere 1921. Esperanbon mi lernis en 1920, sed tiam mi ne sciis, ke mi povus diri kelkajn Esperantajn vortojn al k-do Lenin!

Mi sendas unu internacian respond-kuponon kun peto, ke oni sendu al mi kelkajn malnovajn numerojn de via Zprávy, ĉar mi ŝatus legi iom pri via landa Esperanto-movado. Mi havas tie multajn amikojn. Interalie mi korespondis kun k-do Rudolf Burda, kiam li traktis pri la fondo de Mondpaca Esperantista Movado. Mi scias, ke li jam mortis.

Niaj gazetoj, radio kaj televido multe traktis pri la okazintaĵoj en via lando. Mi tre dezirus, ke ili donu al via Esperanto agado pli da energio, liberecon por internaciaj

rilatoj kaj eblon al viaj membroj vojaĝi al nia Universala Esperanto-Kongreso 1969 en Helsinki. Mi konsideras tre grava vian kunlaboron kun UEA."

## **Ni revenu al nia enketo!**

(En la n-ro 1/1966 ni aperigis alvokon al nia legantaro pripensi kaj proponi la nomon, formaton, enhavon (laŭprocente) de la nova tutŝtata gazeto Ni ricevis multajn respondojn Ni konsideras utila aperigi sinsekve almenaŭ kelkajn. La sekvantan sendis s. Ed. V. Tvarožek.)

1. Kiel n o m o n mi proponas jenajn alternativojn:

- a) ESPERANTO en Ĉeĥoslovakio,
- b) Ĉeĥoslovakia ESPERANTISTO,
- c) LA MOVADO,
- d) NIA MOVADO

Sed mi nepre rekomendas ellasi el la titolo de la nova gazeto la oficialan „Zprávy — Informoj”, ĉar dum ĝi enestis, ni neniam havos gazeton en la vera senco de vorto kaj nia verda publiko (almenaŭ parto de ĝi) havos sian dubon. Oficialaj informoj ja povas enesti — kaj certe enestis — eĉ sen tiu ĉi indiko en la titolo. Sufiĉas indiko en la bibliografia indikaro, ke ĝi estas organo de ĈSEK. Estu farita ĉio en tiu senco, ke la nova nomo de la gazeto varbu, kaj ne malvarbu!

2. Kiel formaton mi proponas A5. — Estas vero, A4 estas pli facile aranĝebla, kaj pli varie, sed mi pensas, ke gravas la fakto, ke A5 estas bindebla, do ke fakte unu jarkolekto donos libron.

3. Esperantismo estas ankaŭ kultura movado, ne estas eble apartigi el ĝi la kulturalan parton, tial estas nenatura afero eldonadi ian apartan „kulturalan aldono”. Kulturaj artikoloj estu aperigataj intermikse kun la ĝeneralaj kaj primovadaj, nur tiam la gazeto havos kaj fariĝos vere gazeto; kun aparta kultura aldono ĝi restus ĉiam nur bulteno, faru la redakcio kion ajn.

4. Anticipe fiksi laŭprocente la enhavon de diversaj literaturaj specoj ŝajnas al mi tute superflua. Mi esperas, ke oni ne intencas ekz. ellasi bonan kontribuadon, ĉar ĝia speco jam ne havas laŭprocentan lokon dispone. Mi ne dubas, ke se la rondo de verkistoj kaj tradukistoj estos revivigita kaj gvidata laŭ sanaj principoj, ne devas esti timo pri tio, ĉu la nova gazeto havos sufiĉe da kultur-literatura materialo de ĉiuj specoj.

## **ĈEĤOSLOVAKAJ PACDEFENDANTOJ PRI I.A INTERCIVITANA MILITO EN NIGERIO**

Helpon al la malsatmortantaj!

La Ĉeĥoslovaka Komitato de Pacdefendantoj eldonis deklaron pri la intercivitana milito en Nigerio. En ĝi oni interalie diras:

„Kvankam ni ne intencas prijuĝi la malsimplan demandon, kiu kulpas pri tiu ĉi plej sangoplana milito en la novtempa historio de Afriko, ni ne povas ne vidi la fakton, ke centmiloj, eble milionoj da anoj de la nacio IBO — inkluzive de

maljunuloj, virinoj kaj infanoj — estas pro la militoperacioj kondamnitaj al terurega malsatmortado.

La nacioj en la mondo kaj aparte iliaj progresemaj fortoj kaj la pacmovadoj ne devas senage rigardi, kiel la eta nacio — eĉ se ĝia ŝtatjura pozicio estas kia ajn — estas punata per sinsekva fizika ekstermado nur pro la neskuebla decidiĝo esti libera kaj sendependa.

Ni alvokas tiujn grandpotencojn kaj ŝtatojn, kiuj per sia liverado de armiloj kaj aliaj militmaterialoj — al kiu ajn militanta flanko — fariĝas kunrespondecaj pri la procedo de tiu ĉi milito kaj ties tragikaj konsekvencoj, **ke ili tuj entreprenu humanismajn agadojn** certigantajn, ke per la militoperacioj ne suferu milionoj da senkulpaj viktimoj.

Ni starigas la demandon, ĉu la baza problemo de la nigería federacio estas malebligi la forsplitiĝon de Biafra eĉ por la kosto de genocido, aŭ protekti kaj savi la popolon IBO antaŭ la fizika ekstermo.

Ni konjektas, ke daŭra kaj fakta unueco de ŝtato ne povas esti konstruata sur genocido de parto de ĝia loĝantaro".

### ALVOKO de la Ĉeĥoslovaka MEM-sekcio

La Ĉeĥoslovaka sekcio de MEM kaj la tuta ĉeĥoslovaka esperantistaro plene aliĝas al la supre citita deklaro de la Ĉeĥoslovaka Packomitato kaj alvokas la Esperanto-organizaĵojn tutmondajn kaj landajn, unuopajn esperantistojn, redakciojn de Esperanto-gazetoj kaj ĉiujn pacamikojn, humanistojn — ĉiujn home sentantajn homojn en la mondo —, ke ili per ĉiuj siaj fortoj kaj rimedoj helpu savi la suferantajn kaj senkulpe mortantajn homojn de la popolo Biafra.

La Ĉeĥoslovaka sekcio de MEM informas vin kun ega bedaŭro, ke pro gravaj kaŭzoj ne okazos la „1—a Semajno de Internacia Amikeco" (SIA) en la urbo Plzeň — Ĉeĥoslovakio en 1968.

La Loka Organiza Komitato de SIA rekomendis tion al la estraro de la Sekcio kaj al la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, ĉar ĝis la prespektiva dato aliĝis nur 52 esperantistoj, el kiuj sendis monon - 6!

Tiu ĉi situacio estis en junio, kaj komence de oktobro — la prokrastita termino — ĝi estis ankoraŭ pli malesperiga. Kontribuis al tio ankaŭ la aŭgustaj eventoj kiel ankaŭ al nia entrepreno (SIA).

Tial la Loka Organiza Komitato post konsiliĝo kun koncernaj MEM — kaj aliaj aktivuloj, decidiĝis fari la supre diritan neĝojigan paŝon malgraŭ tio, ke la ĝisnunaj elspezoj ligitaj kun la preparoj (afiŝoj, insignoj, informaj kaj varbaj materialoj ktp.) atingis tre altan sumon.

Al tiuj kelkaj aliĝintoj, kiuj pagis la koncernan kotizon kaj aliajn antaŭpagojn, la Loka Organiza Komitato resendos la monon dum la plej proksimaj tagoj.

Karaj pacamikoj, la estraro de la Ĉeĥoslovaka MEM-sekcia tamen volas vin cerbigi, ke la fiasko, kiu renkontis nin ĉe la organizaj preparoj de SIA ne forigos nin de plua fervora laboro por paco kaj fakta progreso de la homaro.

Kun pacamikaj kaj kamaradecaj salutoj

Via:

**MONDPACA  
ESPERANTISTA MOVADO  
Ĉeĥoslovaka sekcio**

**KORESPONDI DEZIRAS**

Sieghart ULLRICH, 19-jara junulo, Zum Flughafen 6, 75 COTTBUS-Ströblitz, DDR (Germ. Dem. Resp.) — kun gejunuloj 17-20 jaraj.

Stefano PAWLIK, 26-jara instruisto, LIPICZE 45, pocz. Klonowa, pow. Sievadz, Polska (Pollando), interesiĝas pri pedagogio, junularaj problemoj, sporto kaj ĉiutaga vivo en nia lando. Li kolektas bildkartojn.

Jan ROMANIUK, 19-jara teknikisto, BYKOWCE 82, p-ta Zaluž, pow. Sanok, woj. Rzeszów, Polska (Pollando), interesiĝas pri literaturo, geografio, junularaj problemoj, sporto, turismo. Li kolektas bildkartojn kaj diskojn kun distra muziko.

**LA 17-a SET en LANĈOV 1968**

La ĉi-jara Somera Esperanto-Tendaro, aranĝita — laŭ komisiono de ĈSEK — fare de Esperantista Klubo, Junulara fako, en kunlaboro kun „SVAZARM“-organizo ĉe Kleriga domo de B. Václavek en Třebíč, okazis kiel kutime en du etapoj po du semajnoj, nome I-a etapo 14. 7.-27. 7., II-a etapo 28. 7.— 10. 8. 1968. Kiel tendarestoj funkciis en la I-a Lada Bala el Mor. Budějovice, en la II-a Peter Holba en Zvolen; la ekonomiajn aferojn por ambaŭ etapoj prizorgis la ĉefestro Pavel Sittauer el Třebíč.

La ĉilam kreskanta intereso pri la Esperanto-kursoj en SET montriĝis krom alia ankaŭ en tio, ke la unuan etapon partoprenis entute 137 kaj la duan 129 gelernantoj. Kvankam nur la dua etapo estis aranĝita kiel junulara, tamen en ambaŭ partoprenis je 80-90 % junaj homoj ĝis 30 jaroj, grandparte knabinoj. Proksimume unu triono de la gekursanoj venis el Slovakio. Multajn aliajn interesulojn oni devis rifuzi pro manko de loko.

En ambaŭ etapoj partoprenis proksimume po 30 alilandaj gekursanoj, el 8 landoj (Bulg., Hung., Pol., GDR, GFR, Aŭstrio, Nederl., Svedl.). Inter tio estis ankaŭ nombraj grupoj da komencantoj el Bulgario kaj Hungario, por kiuj oni devis aranĝi apartajn kursojn; tio ĉi kaŭzis certajn organizajn malfacilaĵojn kaj ne kontribuis al pli alta nivelo en la tendara vivo.

La instruado okazis dum 5 horoj antaŭtagmeze, la kvina instruhoro estis dediĉita al komuna ekzercado de novaj Esperanto-kantoj.

En la unua etapo-sub gvido de ĉefinstruisto Josef Vitek el Mělník — la frekventantoj estis dividitaj entute en 13 instrugrupojn, inter kiuj la plej multaj apartenis al kursoj B — progresintoj (56). En la dua etapo — sub gvido de ĉefinstruisto Zdeněk Hršel el Brno — estis entute 9 instrugrupoj, inter kiuj la plej multaj kursanoj apartenis al kursoj A — komencantoj (55) kaj unu grupo estis aranĝita kiel kurso D — por instruistoj.

Por la bazaj kursoj A kaj B oni uzis la specialajn malgrandajn lernolibrojn ABC kaj vortaretojn „808“ de Theodor Kilian. En la kursoj C — konversaciaj kaj D — por

instruistoj estas aplikataj diversaj tekstoj laŭ elekto de koncernaj kursgvidantoj. Ĉi tie mankas la necesa unueco.

Fine de ĉiu kursetapo la frekventantoj submetiĝis al skribaj kaj buŝaj ekzamenoj antaŭ specialaj komisionoj kaj ricevis atestojn. Ĉi-jare en la dua etapo estis la unuan fojon aplikitaj por la ekzamenoj la principoj de provizora Instru- kaj ekzamena regularo de ĈSEK (eld. 1966).

La posttagmezoj kaj vesperoj estis dediĉitaj al variaj sportoj, ludoj, refreŝiĝo kaj amuzo de la tendaranoj. Kiel programestroj funkciis en la I-a etapo Jan Tichý kaj D. Kočvara, en la II-a Inĝ. Sviták kaj Zd. Hršel. Oni praktikis pilkludojn, badmingtonon, naĝadon, remadon, diversajn konkursojn kaj skoltan „kastoradon“, en kiuj la venkintoj estis premiitaj. En ambaŭ etapoj okazis po du duontagaj ekskursoj al la kasteloj Vranov kaj Bítov, elektoj de „Miss SET“ kaj internaciaj karnavaloj. Dum la unua etapo efektiviĝis ankaŭ komuna tuttaga ekskurso al la kastelo Lednice. La ĉefaj amuzaj programoj okazis dum la vesperaj solenaj bivakfajroj kaj interbabiladoj. La tendaranoj ĝuis improvizitan prezentadon de amuzaj scenoj, deklamon de poemoj kaj plejparte belegan kantadon de Esperantaj kaj naciaj kantoj kun akompano de gitaroj kaj mandolino. Dum ambaŭ etapoj, laŭ invito de najbaraj tendaroj de junpioniroj, estis aranĝitaj amikaj programvesperoj.

La vivo kaj medio en la tendaro estis ĉiam amika, vigla kaj bonhumora, nur en la unua etapo ĝi estis malfavore influita per la malbona vetero. La tendaron vizitis por 1-2 taga restado pluraj eksterlandaj gastoj kaj ankaŭ enlandaj funkciuloj, ekz. la direktoro de Kleriga domo el Třebíč Frant. Sedláček, reprezentanto de Kleriga instituto el Praha Jiří Pondělíček, Prof. Kilian k. a., kiuj kontribuis per siaj paroladoj aŭ eĉ programeroj al variigo de la tendara vivo. Dum ĉiutaga interesa komuna vivo, studado kaj amuzado kreiĝis inter la frekventantoj baldaŭ vere intima medio, estis ligitaj multaj personaj amikaj rilatoj kaj la tagoj fulmrapide pasis. Ĉe la adiaŭo ekbriletis en la okuloj de multaj tendaranoj larmoj de kortuŝa feliĉo kaj samtempe de malgajo pro la disiro.

La Someran Esperanto-Tendaron en Lančov necesas valortaksi kiel unu el la plej gravaj vivofontoj de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado. Ĝi edukas kaj liveras al ni ĉiujare aron da novaj esperantistoj, plurajn funkciulojn kaj instruistojn. La eksterlandaj gastoj rigardas ĝin ofte kun admiro kaj eĉ iom da envio. La meritoj kaj dankoj apartenas precipe al la gvidantoj de Kleriga domo kaj Esperantista klubo en Třebíč frunte kun Pavel Sittauer kaj al vico da ceteraj sinoferemaj kaj spertaj kunlaborantoj.

Je la fino kelkaj rekomendoj:

1. Nia estonta junulara asocio (ĈSEJ) emu konsideri kaj akcepti en proprajn agadplanojn la kunorganizado de SET kiel unuarangan, daŭran taskon.


2. La nunjara nombro de partoprenantoj (pli ol 150) montras sin jam ne bone regebla kaj la spaco de la tendarejo nesufiĉa; kiel plej konvena nombro — laŭ la ĝisnunaj spertoj — ŝajnas maksimume 100 gekursanoj (en unu etapo).

3. Estonte necesas akcepti el eksterlando kiel kursanojn senescepte nur esperantistojn, kiuj kapablas partopreni la C-kurson; tiun ĉi kondiĉon oni fiksu jam en la prospektoj!

4. Estus dezirinde, se la organizantoj de SET disponigus la adresojn de la

kursabsolvintoj (kun indiko de kurso) al niaj E-kluboj, por ke oni povu varbi ilin kiel membrojn kaj por daŭrigo en la studado de Internacia Lingvo.

Sv-



F. V. Lorenz: PRI LA SLAVAJ LINGVOJ  
 Fotokopio de la neforsendita kaj nefinskribita letero al nekonata. amiko. Vidu pri tio la artikolon de Ladislav Cibur „Interesa trovaĵo en Zbyslav== en la n-ro 3-4 (1968 de nia gazeto).

## RADIO VARSAVIO ĈIUJARE OKAZIGAS SPORTAN KONKURSON

La Konkurson povas partopreni kaj tiuj samideanoj, kiuj aŭskultas la Esperanto-elsendojn de la Pola Radio kaj tiuj, kiuj ne aŭskultas, sed interesiĝas pri la temo. Al la interesitoj ni volonte disponigos deziratan kvanton da informiloj kun detalaj kondiĉoj de la partoprenebleco.

Kaptante la okazon ni deziras romomorigi, ke po unu el la ĉefpremioj en la antaŭaj konkursoj de la Pola Radio — senpagan vojaĝon tra Pollando inkluzive senpagan ambaŭdirektan vojaĝbileton — gajnis samideanoj: Einar Dahl (Svedujo), George Hartree (Britujo), Norman Booth (Britujo), Uwe Lehse (Danlando) kaj Giovanni Marchieri (Italujo).

Por pligrandigi la ŝancon en la lotumado oni povas sendi kelkajn respondojn, sed ĉiun sur aparta afrankita poŝtkarto aŭ en aparta letero.

Esperanto-Redakcio  
de la Pola Radio  
en Varsovio, Pollando



Esperanto-rondeto ĉe Chirana, nacia entrepreno, en Pieštany ĉi-jare okazigis sukcesan renkontiĝon en la montara kabano sur Bezovec.

**Telekomunikada terminaro** de inĝ. Al. Jauŝkin (Kazan, USSR) aperas en Heroldo (Bulteno de IPTEA, Sofia). La terminoj estas difinitaj en Esperanto kaj aldonitaj ekvivalentoj en la angla, germana kaj rusa.

### **Kiam aperos Plena Ilustrita Vortaro?**

Esperanto 61, 1988 VI, n-o 6, p. 77 SAT anoncis eldonon de la manuskripte preta Plena Ilustrita Vortaro, kiam almenaŭ 2000 personoj certigos ĝin mendi kaj pagi. La manuskripton preparis dum multaj jaroj prof. Waringhien. La verko havos 1584 paĝojn en la formato 14 X 19,5 cm kaj tolan bindaĵon. La ilustraĵoj ampleksas 12 — 12 paĝojn. La vendoprezco estas 69 guldenoj (t. e. 19 dol. aŭ 95 NF). UEA petas, ke ĉiu, kiu estas preta la verkon aĉeti — kaj tion certe intencas ĉiu serioza esperantisto kaj klubo — skribu al UEA sian promeson mendi kaj pagi ĝin. — En Ĉeĥoslovakio ekzistas eblo libere mendi librojn el kapitalismaj landoj pere de librovendejoj de Zahraniční literatura (Sovětská kniha). Informiĝu tie.



### **Ponto interkontinenta.**

Esperanto 61, 1968 VI, n-o 6, p. 86-87 Fred Parker raportas pri uzo de Esperanto kiel pontlinvo inter elementaj lernejoj en Anglujo kaj Japanujo. 40 infanoj en Nagoja skribas personajn leterojn, japana instruisto tradukas ilin en Esperanton kaj sendas al Anglujo (lernejo Marsden en Nelson), kie ilin instruisto tradukas en la anglan. En ambaŭ kazoj helpas lokaj esperantistoj. La korespondado kondukas al pli bona scio pri abiaj landoj, homoj kaj moroj. Ekinteresiĝis ankaŭ aliaj instruistoj.

**La devaluto de finnlanda mono je 31,25 %** signifas por finnaj esperantistoj altigon de kotizoj por eksterlandaj asocioj (UEA) kaj de abonoj por eksterlandaj gazetoj je proksimume 30 %. Male, eksterlandano venanta en Finnlandon ricevos kontraŭ sia mono pli multe da finnaj markoj, tiel ke la prezoj por ili estos proksimume je kvarono pli malaltaj ol antaŭ la devaluto. Laŭ Esperanta Finnlando n-o 6/1967.

## **Ĉu V. I. Lenin rilatis favore al Esperanto?**

(Daŭrigo de la artikolo de Ints Ĉaĉe)

### **LA JARO 1918:**

La persona Sekretario de Vladimir Iljiĉ Lenin, poligloto — kapitano Ernesto Karloviĉ Drezen — antaŭa Prezidanto de Petrograda Esperanto-Societo „Espero” — avizas nin, la estraranojn de Petrograda Esperanto-Societo „Espero”, ke sabate — la 13-an de Aprilo je la 13-a horo — VLADIMIR ILJIĈ LENIN invitas la reprezentantojn de Petrograda Esperanto-Societo „Espero” viziti la Instituton de Smolnij. — Ni pretiĝis al la grava vizito: Prezidanto de la Esperanto-Societo „Espero” — profesoro Vasilij Nikolaeviĉ Devjatnin kaj la Sekretario — Ints An- dreeviĉ Ĉaĉe.

Vladimir Iljiĉ LENIN akceptis nin surprize afable. Li forlasis sian skribotablon — venis al ni renkonten ĝis la mezo de la ĉambro kaj per ambaŭ manoj amike premis niajn manojn. Poste li starigis al ni du gravajn demandojn:

a) Kiom da esperantistoj estas en Ruslando?

b) Per kio la ruslandaj esperantistoj antaŭvidas helpi al la Nova Soveta Socialisma Registaro?

Profesor Vasilij Nikolaeviĉ Devjatnin movas la ŝultrojn — oni ne scias!

Savi la situacion el la stagno penis mi dirante, ke:

„En tuta vasta Ruslando la dissemataj esperantistoj plejparte estas unuiĝintaj en Esperanto-Societoj. Kaj laŭ oficialaj datoj en tuta Ruslando ĝis la Oktobra Revolucio oni nombris 362 Esperanto-Societojn!”

La Regnoestro — LENIN — estis tre kontenta: „Oni devas kunvoki Tutruslandan Kongreson de Esperantistoj. La Kongreso okazu en Petrogrado, kien de ĉiuj 300 pagintaj Esperanto-membroj venu po unu Esperanto-delegato. Pri la venonta agado decidus la Esperanto-Kongreso mem!”

\*

VLADIMIR ILJIĈ LENIN ekridetis kaj diris, ke dum la emigraciaj jaroj ankaŭ li — konatiĝis kun la lingvo ESPERANTO.

Iu el parizaj esperantistoj estis sendinta al li franclingvan Esperanto-lernolibron de Kar kaj Panje (profesoro Théophile Cart kaj profesore Emil Pangne) — en 10 lecionoj. Pro politikaj kaŭzoj unu fojon ankaŭ LENIN eluzis la lingvon Esperanto — dum Brusela Kongreso de la II. Internaciano — la 19-an de Junio 1914.

La historiaj datoj certigas al ni ke jam en la jaro 1912 VLADIMIR ILJIĈ LENIN anoncis sin antaŭ la tuta homaro kiel esperantisto. Dum la VIII-a Tutmonda Esperanto-Kongreso en Krakov (25-jara ESPERANTO Jubilea Kongrese) la 13-an de Aŭgusto 1912 je la 13-a horo — de la podiumo en „Stary Theater" de la urbo Krakov LENIN (ULJANOV) deklaris al la tuta mondo ke:

„ESPERANTO ESTAS  
LATINO DE PROLETO!"

Al la 25-jara Esperanto Jubilea Kongreso en Krakov la tiama Ruslanda emigranto — advokato VLADIMIR ILJIĈ ULJANOV venis piede kune kun sia amiko-kuracisto. Hirŝ Hillerson. Ili ambaŭ tiutempe pasigis la sezonon en la karpata kurorto — vilaĝo P o r o n i n (Galicio), 7 verstojn de la gubernia urbo K r a k o v. (Daŭrigota).

## DU INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ

(Fino de la artikolo de S. Z.)

Esperantistino mi estas jam longe: pro familiaj tradicioj kaj pro propra intereso mi ellernis Esperanton en la j. 1939, estinte 11-jara. Sed nur en la j. 1959, do post 20 jaroj, mi havis la eblon partopreni unuafoje Universalan Kongreson de Esperanto en Varsovio.

Mi veturis tien kun aliaj delegitoj el Ĉeĥoslovakio, plena de atendoj kaj malklaraj timetoj, ĉar ĝi por mi signifis unuafoje praktikan ekzamenon kaj pruvon de miaj esperantlingvaj scioj en eksterlando. Nature, jam antaŭe en Prago kaj alie en Ĉeĥoslovakio mi paroli Esperanton kun multaj esperantistoj el diversaj landoj, kun diversanacianoj, kaj neniam mi havis eĉ etajn malfacilaĵojn. Sed mi havis ankoraŭ en tria memoro la streĉon kaj febran laboron de la I-a Simpozio de Postgraduaj Medicinaj Institutoj en Prago kaj pro tio mi sentis ian obtuzan sonon de antaŭtimo. Sed ambaŭ timetoj montris sin vanaj. Mi partoprenis la kongreson kun ĝojo kaj profunda emocio; mi revenis hejmen entuziasmigita.

Mi ne povas ja kompari ambaŭ renkontiĝojn el multaj flankoj, eĉ mi ne volas tion. Dum la simpozio en Prago mi ne estis partoprenantino, sed nur flanka ĉeestantino, kiu lue laboris tie. Male en la Universala Kongreso mi estis tute regula delegitino-kongresanino kun rajto partopreni ĉiujn traktadojn, sed mi ne vidis la preparuirejon de la kongreso. Tamen miaj malgrandaj spertoj el ambaŭ internaciaj renkontiĝoj estas enigintaj al mi certajn generalajn konkludojn.

La Universala Kongreso de Esperanto havis ĉirkaŭ 4000 kongresanojn, kio estas pli ol dekoblo de la kvanto de la simpozianoj en Prago. Tia amaso da homoj

postulis loĝi kaj manĝi, kaj tiuj kaj la aliaj servoj elspezigis certe egajn monsumojn. Ankaŭ la elspezoj por preparaj laboroj, organizado kaj kongres-traktadoj supozeble ne estis malaltaj. Sed eĉ ne unu monereto estis elspezita por traduk-servo, aparatoj kaj interpretistoj, por tradukkajutoj kaj multobligado de la tradukitaj tekstoj, pro diferenco de lingvoj. Estis eĉ surpriziga, kiagradan komprenon oni povis atingi en tio, nur pere de Internacia Lingvo Esperanto, kiun ĉiu regis tiel, kiel li ĝin ellernis. Tio estis io tute neimagebla por la simpozianoj en Prago; sen tiuj monstraj traduk-aranĝaĵoj la simpozio estus simple neebla. Tion postulis la 300-400 homoj, kiuj partoprenis la simpozion; por la 4000 kongresanoj en Varsovio ĝi estis tute superflua! Mi sentis min en tiu kongreso, kiu kompare kun la Praga simpozio estis vere internacia kaj monda, kiel en mia propra lando, kvazaŭ hejme. Kun grandaj intereso kaj ĝuo mi aŭskultis ĉiujn traktadojn, same kiel la aliaj, tute senpere kaj tuj mi reagis al ĉio; libere min esprimante kvazaŭ en mia gepatra lingvo. En koridoroj kaj antaŭsalonoj grupoj da diversanacianoj vigle debatis; en restoracioj, manĝejoj, trinkejoj kaj bufedoj, sur stratoj, en hoteloj kaj en tranoktejoj ekflamis interparoloj, babiladoj, amuzoj kun ridetoj kaj ridoj sen bridoj. Iam la kongresanoj diskutis eĉ disputis dum longaj horoj pri diversaj demandoj kaj unuopaj problemoj de la referaĵoj, dum la kongreso aŭskultitaj. Tute absorbiĝintaj ili eluzis la planitajn kaj hazardajn trafojn kun konataj kaj rekonataj kongresanoj por debatoj kaj konversacioj eĉ dum tutaj noktoj! Kiel mi dezirus, ke ion similan estus povintaj travivi la simpozianoj, kiuj certe ne povis tiel amase kiel la kongresanoj ĉion ĉi fari kaj kunveturigi hejmen riĉajn kaj profundajn impresojn pri personaj kontaktoj kaj emocioj de amikeco. Ĉiuj kongresanoj havis grandan eblon ligi kontaktojn kaj rilatojn kun personoj, kiuj havis kun ili komunajn ideojn, fakajn problemojn kaj similan solvon de diversaj demandoj kaj kun tiuj homoj poste korespondi. Estiĝis tie veraj internaciaj amikecoj!

Mi bedaŭras nur tion, ke mi ne partoprenis la kunvenon da TEKA (tiam ankoraŭ ne alinomita je UMEA) por povi pritaksi la lingvan nivelon de faka medicina sekcio. Oni ne povas kompari, ĉar faka terminaro en naciaj lingvoj estas disvolviĝinta laŭbezzone, dume la esprimpovoj de la faka lingvaĵo en Esperanto estas ankoraŭ ligitaj pro ĝia ĝenerala malofteco. La faka terminaro estas ankoraŭ dormanta Rozinjo, kiu atendas sian kavaliron-vekiganton, por ke ĝi povu ekbrili per sia vera lingva kapablo kaj internaciaj kvalitoj.

Ĉu eblas komuniki esencon de tiuj du malsamaj travivaĵoj al neesperantistoj? Ŝajnas al mi, ke ne. La neesperantistoj nenion komprenos, ili neniam ion similan travivis kaj simple ne kredas, ke tia interkompreno estas ebla!!! Ili estas jam alkutimiĝintaj al sia duon-kompreno kaj propra nekvalita esprimiĝo en fremda lingvo. Almenaŭ ĉeĥoj kaj slovakoj kaj ĉiuj malgrand-nacianoj havas malavantaĝon en tio. Ili pene estas akiritaj unu elektitan mondlingvon el ĉiuj eblaj (ĉar ili estas pliaj), lerninte ĝin el libroj — en fremda al ĝi medio — en sia patrolando. Tio signifas, ke ili povas regi ĝin nur certgrade, oferinte al la lernado kian ajn tempon — ĉu longan ĉu mallongan — kaj tio ankaŭ limigas kaj steriligas ilian parolkapablon ĉe ĉiuj internaciaj renkontiĝoj. Nur nemultaj el ili havas la ŝancon kaj avantaĝon vivi kelkajn jarojn en fremdlando kaj tie ellerni la elektitan lingvon de la nacianoj mem, kaj ekposedi tiel la lingvon pli perfekte. Do dum tiuj kondiĉoj la grand-nacianoj, kiuj

parolas de sia infanaĝo iun el la mondlingvoj kiel sian lingvon gepatran, ĉiam kaj ĉe ĉiu internacia renkontiĝo havos avantaĝon de sia tutperfekta regado de la lingvo. Ili regos ĉiun konferencon, ĉiun kunsidon, ĉiun kongreson internacian aŭ mondiskalan, eĉ se ilia kapablo estas pli granda sur lingva kampo ol ilia erudicio faka aŭ scienca.

Mi pensas, ke ĝuste pri tio estas necese, ke fakuloj esperantistoj grupiĝu kaj unuiĝu en fakaj asocioj kaj sekcioj kaj ekagu por enkonduki Esperanton en la praktikon, en la de sia propra fako. Kaj unu el la taskoj de fakaj organizaĵoj mi vidas en tio, ke ĝi ne nur akceptu kaj kultivu Esperanton kiel fakan lingvon de siaj propraj kunvenoj kaj seminarioj, sed klopodu akceptigi ĝin sur monda forumo kiel unu el la oficialaj lingvoj de internaciaj konferencoj, simpozioj, festivaloj, kongresoj ktp. neesperantistaj. Ankaŭ Medicina Sekcio de ĈSEK tion postulu pere de la agado de siaj membroj, kiuj ankaŭ partoprenadas neesperantistajn fakajn kongresojn kaj kunsidojn plinaciajn; ĝi estas mia opinio ankaŭ unu el ĝiaj taskoj.

Sonjo Zednik



Pro manko de spaco la sekvantajn fotokopiojn ni povos aperigi nur en la 3. kaj 4. numeroj de nia gazeto.

# TEKNIKA SEKCIO DE ĈSEK

progresas en sia prepara organiza laboro, kvankam la intereso pri kunlaboro iom postrestas la supozojn, dume aliĝis 55 teknikistoj (en julio 68). Lastatempe estis starigitaj kvar fakaj grupoj por koordini fakan agadon de kunlaborantoj: elektroteknika, maŝina, kemia, konstrua. Ĉiu grupo havas sian estron kaj fak-lingvan zorganton. Por ebligi kontakton al novaj interesitoj ni notas la adresojn:

Elektra fako: Inĝ. Ivan Slávik, Nová Dubnica C I-6/13

Maŝina fako: Inĝ. Ladislav Krajíc, 9. května 1458/25, Tábor

Kemia fako: Inĝ. Hanuš Landsperšký, Husinecká 4, Praha 3

Konstrua fako: Inĝ. Jan Werner, Kroftova 84, Brno 16.

Alifakaj teknikistoj povas sin anonci ĉe la sekretario de la Teknika Sekcio de ĈSEK: Inĝ. J. Werner (adr. supre). Por siaj kunlaborantoj eldonas la Sekcio neregulan multobligitan informilon „TS de ĈSEK informas”.

## **Teknikistoj kunvenis en Budapeŝto.**

Budapeŝta renkontiĝo de teknikistoj-esperantistoj (20-21 Majo 1968) arigis en impona sindikata domo MÉMOSZ kvardekon da fakuloj el diversaj branĉoj kaj el tri landoj: Hungario, Bulgario kaj Ĉeĥoslovakio. La programo konsistis el pluraj prelegoj, filmprezentoj, vizito de Internacia Foiro kaj reciprokaj interparoloj pri problemoj ĉirkaŭ eluzo de esperanto en tekniko. El la prelegoj ni notas kelkajn: La plej novaj modeleksperimentoj hidraŭlikaj (Inĝ. O. Haszpra), La lingvaj problemoj de komputado (Inĝ. A. Münnich), Pri trafikaj problemoj de Budapeŝt (Prof. L. Kőkény), Muntaj konstrusistemoj silikataj en ĈSSR (Inĝ. J. Werner).

## **INTERHELPO**

(El „Internacia Ĵurnalisto, januaro— marto 1968)

En soveta gazetaro de tempo al tempo aperas Esperanta vorto „Interhelpo”, skribata per cirilaj literoj. En la artikoloj estas rivelata jen per unu faceto, jen per alia preskaŭ forgesita historio.

La gazeto "Pravda" skribas en sia numero de 14. I. 1967: „Interhelpo” estas rimarkinda paĝo en la duonjarcenta analo de l' nuna socialisma lando, la glora ĉapitro de ĉeĥoslovaka historio, kapta novelo pri amikeco kaj frateco de l' popoloj”. Kaj ĝi citas kelkajn nomojn de Interhelpoanoj: Karel Šulc, Rudolf Mareček, Filip Svolík, Ondrej Palinkaš — entute en la agrikultura kooperativo „Interhelpo” partoprenis reprezentantoj de 14 nacioj.

Dufoje ĝia prezidanto estis Julius Fučík la glora ĵurnalisto, viktimo de la nazioj.

Unuafoje mi legis pri Interhelpo en la tagoj de ĝia fondiĝo en la dudekaj jaroj en Esperantaj gazetoj. Poste mi renkontis kelkajn eseojn pri ĝi en la populara soveta ilustrita revuo „Ogonjok” (Fajreto), skribitajn de la konata ĵurnalisto Tatiana Tess. Poste aperis kelkaj raportaĵoj en „Pravda” kaj „Komsomolskaja Pravda”.

Kaj fine la 6-an de januaro 1968 aperis granda frontpaĝa artikolo pri Aleksandr Dubček — la nova sekretario de CK de KPĈSSR kiel pri la filo de la estinta Interhelpo-ano. Kaj nun mi volus esprimi kelkajn miajn pensojn kaj konsiderojn pri la eventoj.

Unue. „Interhelpo" estas tre rimarkinda mejloŝtono en la historio de USSR — ĈSSR interrilatoj. Ĝi estas same grava por ĉeĥoslovaka popolo, kiel ankaŭ por la soveta. En la plej peza kaj malfacila periodo de l' USSR — historio simplaj homoj el ĈSSR impetis en Sovetan landon por helpi per siaj fortoj, siaj scioj, siaj iloj en rekonstruo de la socia strukturo.

Due. Kiel sekvo de tio ĉeĥoslovakaj TEĴA-anoj farus bonan servon al nia komuna afero, se ili kolektus kaj publikigus intervjuojn kaj rememorojn de la estintaj „Interhelpo"-anoj kaj, eble, eĉ kompilus la historion de tiu fragmento de la ĝenerala historio. Tio estus bela kontribuo al internacia TEĴA-kunlaboro.

Trie. Por esperantistoj-ĵurnalistoj tio havus specifan intereson. Ja la kreintoj de „Interhelpo" estis esperantistoj. En la unika nomo „Interhelpo" por ĉiam restis en Soveta historio kaj toponimiko la esperantista iniciato kaj entrepreno, kiu por ĉiam brilos kaj lumigos la amikecajn ligojn inter la popoloj.

Interhelpo estas tiu fakto, entrepreno kaj atingoj kiu prezentas samtempe gravan nacian, internacian kaj Esperantan valoron.

Transloĝiĝis samtempe tuta grupo da esperantistoj de 14 nacioj en unu lokon en Kirgizio, ĉe la urbo Frunze (tiam Piŝpek) kaj inaŭguris la 24-an de aprilo 1925 la novan popoliniciatan kreaĵon — la kooperativon, poste ili konstruis domojn, elektrostacion, ledan uzinon, drapan fabrikon. En la tuta iniciato estis herolda alvoko de granda potenco pri paca kunlaboro.

En la jaro 1935 Julius Fučík skribis: . . . Pleje ĝojigas min la fakto, ke „Interhelpo" dum la jaroj ĉesis esti ĉeĥoslovaka insulo en la soveta oceano. Ĝi tiom kunfatidiĝis kaj interplektiĝis kun la soveta vivo, tiom enplantiĝis en ĝin, ke nun ne estas able elŝiri Interhelpon el la soveta vivo."

Tial ni devas unuavice en nia Esperanto-gazetaro kaj, certe, antaŭ ĉio en „IĴ" rakonti pri la ĝermiĝo, naskiĝo de Interhelpo, pri ĝiaj faroj kaj atingoj por ke la kolegoj esperantistaj ĵurnalistoj ekkonu tiun gravan Esperanto-eventon kaj ĉerpu en ĝi sian inspiron, siajn temojn, siajn sociajn taskojn.

Tiu trezorejo de interpopola kunago, kie sian konvenan lokon okupis la internacia lingvo, devas esti konstanta vojmontra stalo en la venkoporta aliro de l' esperantistaro. Kaj la Esperanto-helpo en „Interhelpo" same kiel simila helpo fare de la internacia lingvo en la Internaciaj brigadoj de la popola Hispanio en la jaro 1936 devas esti tute klare kaj plenmezure aprezitaj, komprenitaj kaj priskribitaj de modernaj esperantistoj-ĵurnalistoj — niaj kolegoj TEĴA-anoj, ĉar la sperto de la pasinto estas ekstreme grava por la nuntempo kaj por la estontaj gravaj kaj grandaj faroj de la tutmonda esperantista movado.

N. D.



Ekzistis iam en Bratislavo, la ĉefurbo de Slovakio...

**Korekto-alplenigo al la artikolo Ĉu ekzistos libroj en la XXI-a jaroento?** En la antaŭa n-ro, pĝ 11 elfalis la nomo de ĝia aŭtoro Ing. Ivan Slávik el Nová Dubnica en Slovakio. Ni petas pardonon!

La redakcio.

**Co nevíte o esperantu?** Osvětový ústav v Praze vydal pro Ĉs. esperantský výbor 50-stránkovú brožuru red. O. Kníchala nákladem 3000. Cena Kčs 4,50. Adresa: OÚ v Praze 2, Vinohrady, Blatnická 4.

**Esperanto-Revuon en blindulpresu** eldonas Eldonejo de la Germana Centro-Librejo por Blinduloj, GDR 701 LEIPZIG, Gustav-Adolf - Str. 7, Poŝtfako 245. Petu senpagan provnumeron!

**Geologio Internacia**, paĝoj 196, prezo Kčs 18,— aperis sub aŭspicio de ISAE, redaktis D-ro J. Kavka, Lužná 7, Praha 6 — Vokovice.

## Přípravný výbor ČES

Na mimořádném zasedání ČSEV (česká část) dne 13. 7. tr. v OÚ v Praze byl ustaven samostatný přípravný výbor Českého esperantského svazu ve složení:

Tomáš Balda, Řevnice 416, o. Praha-západ

Vladimír Bořánek, Blatenská 25, Plzeň

Drahomír Kočvara, Dolní č. 1, Ostrava 4

Jaroslav Mařík, M. Štěpánská 9, Praha 2

Pavel Sittauer, Riegrova 26, Třebíč

Ing. Fr. Sviták, Jabloňová 39, Praha 10

Josef Vitek, Ĉs. armády 26, Mělník

Josef Vondroušek, Botanická 31, Brno

Přípravný výbor bude mít za úkol zajišťovat další přípravy na ustavení nové organizace, především schválení a registraci organizačního řádu (stanov) u příslušného ministerstva.

## REZOLUCIO II. EN MADRID

La 53-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Madrid de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1968, kun 1800 partoprenantoj el 40 landoj, aŭdis Raporton de S-ro M. Jaumotte pri la situacio de Esperanto sur la kampo de turismo.

La Raporto, bazita grandparte sur la rezultoj de la Enketo farita laŭ la decido de la Konsilantaro de la Internacia Akademio de Turisma, klare montras la jam grandan praktikan aplikadon de Esperanto por turismaj celoj.

Preskaŭ 700 turismaj organizaĵoj tra la tuta mondo jam praktike utiligas la Internacian Lingvon Esperanton eldonante broŝurojn aŭ prospektojn; ŝtataj oficejoj de pluraj landoj jam eldonis Esperanto-filmojn por la propagando de sia landa turismo; radio-stacioj de 19 landoj faris — en 1967 — pli ol 2000 elsendojn en Esperanto por disaŭdigi interalie turismajn novaĵojn; U. N. E. S. C. O., la organizaĵo por Edukado, Scienco kaj Kulturo de U. N., rekonis Esperanton kiel gravan rimedon por kulturaj interŝanĝoj; la fervojaj administracioj de Aŭstrujo, Germanujo, Hispanujo, Finnlando, Italujo, Svislando kaj Jugoslavio utiligas Esperanton por horaroj kaj aliaj praktikaj celoj; pli ol 3500 delegitoj de Universala Esperanto-Asocio en 63 landoj disponigas siajn servojn ankaŭ por turismaj celoj.

Sekve, la Kongreso varme aprobas la Enketon faritan de la Internacia Akademio de Turismo kaj aliĝas al la deziro esprimita de tiom da Fakaj Organizaĵoj, ke la Faka Vortaro de Turismo, en kompetenta eldono de la Akademio, estu pliriĉigita per Esperanto-traduko.

La Kongreso esprimas sian altan estimon kaj profundan simpatian al la Akademio, kiu akcelas la pacon per kultura kaj kultivata turismo, same kiel Universala Esperanto-Asocio realigas, interalie, ankaŭ tiun celon per la Internacia Lingvo, kiu ebligas proksimiĝon de la popoloj, prezentante al ĉiuj homoj de bona volo la eblecon por pli bona interkompreniĝo.

Por la 53-a Universala Kongreso de Esperanto La Prezidantaro:

Prof. D-ro Ivo Lapenna, Direktoro E. L. M. Wensing, Direktoro E. Carlén,  
S-ro G. Becker, Prof. D-ro M. Sancho Izquierdo

**Kiel esti bona kongresano.** IOE-Gazeto, 1968 II/III, n-o 17/18, p. 15. — Lan Union des Associations Internationales (Bruselo). El la konsiloj: Pripensu, kion vi atendas de la kongreso. Memoru, ke ĝi daŭros nur kelkajn tagojn. — Estu aktiva, klarpensa, aperta al alies ideoj. Nek egocentra, nek naciema, nek grumblema. Partoprenu la diskutojn, ne pro la plezuro aŭdigi vian voĉon, aŭ ke via nomo eniru en la protokolon, sed por esti utila al la afero mem. — Profitu la manĝohorojn, akceptojn, paŭzojn kaj ekskursojn por ŝanĝi grupon anstataŭ resti kun viaj samlandanoj, ĉe la sama tablo aŭ en la sama aŭtobuso.

## FAKLINGVO / TERMINAROJ

TECHNISCHES WÖRTERBUCH DEUTSCH-ESPERANTO de Dipl. Ing. Rudolf Haferkarn aperis en „Esperanto Press" (Kanado) fine de 1967. 84 pĝ.

MANUSKRIPTON DE SCIENC-KEMIA FAKVORTARO pretigis Dro Ing. Arpád Máté en aranĝo hungara-Esperanta kaj male. 3000 terminoj.



ESPERANTO-BULGARAN FAKVORTARON PRI METALTRANĈAJ MAŜINOJ verkis Inĝ. St. Minkov. La eldonon preparas la bulgara sekcio.

ĈEĤAN-ESPERANTAN FAKVORTARON PRI MAŜINELEMENTOJ kompilis Inĝ. L. Krajíc. Estas nia tasko zorgi pri ties aperigo.

NAŬLINGVA ELEKTROVORTARO eldonata de Internacia Elektroteknika Komitato kunlaboranta kun UNESCO estu baza materialo por serioza laboro, ĉar ĝi mem estas jam en internacia rango farita laboro — skribas Inĝ. N. Lipták.

ELEKTRONIKAJ AŬTOMATOJ. KOMPUTILOJ. — „OPERACIADO-FAKA TERMINARETO" G-A-F estas preparata de D-ro G. Kalckhoff, delegito de ISAE por okc. Germanio, direktoro de la Siemens-Kalkulcentro en Munkeno. Kontribuadojn oni sendu al D-ro G. K., Schuckertstr. 14'X., 8 München 25, Germanio (BRD).

IL-MAŜINOJ. — S-ro Edward M. Rosher, famkonata verkisto en la teknika nomenklaturon, eldonis en januaro 1968 IL/MAŜINAN NOMENKLATURON en 6 lingvoj, nome Eo-A-F- G-H-I.

### KONTAKTOJ

KUNLABORI PRI MATEMATIKAJ PROBLEMOJ, pri kibernetiko, kalkulmaŝinoj, ĝiaj skemoj kaj Logika kalkulo pretas: M. Mackiewicz. Torun Mickiewiczza 146/1, Pollando.

KOLEKTO PRI MALFORT-KURENTAJ APARATOJ fabrikataj de la hungara fabriko ML (Mechanikai Laboratárium Budapest) „Erzeugnisse" (en la germana lingvo) estas disponigita al nia Elektrofako (gvid. Inĝ. I. Slávik). Pri la temo pretas kontakti kun samfakuloj: Inĝ. László Baka, Dunakeszi, Károlyi u. 12-13. Hungario,

### TEKNIKA NORMALIGO KAJ ESPERANTO

En ĉs. oficiala gazeto „Normalizace" n-ro 1/1968, pĝ. 19, en la artikolo „Náměty pro propagaci a popularizaci technické normalizace" (Sugestoj por propagi kaj popularigi teknikan normaligon) Inĝ. Vladimír Buráň el Sciencesplora Instituto de Karbo skribas i. a.: „ . . Sed studo de fremdaj lingvoj prirabas milionojn da kvalifikaj fakuloj pri multo da tempo kaj energio, kiujn oni povus dediĉi al plia perfektigo en sia fako. Sed la tempoperdoj okazas al ĉiuj homoj, eĉ se ili lernas eble nur unu fremdan lingvon. Kaj la problemoj estas ja normalige solvita jam delonge — en formo de Esperanto, t. e. unueca interkompreniĝa tutmonda lingvo, arte kompilita kaj tial speciale simpla, kiun facile ellernas ĉiu homo meze talentita ĝis sia 14-a aĝojaro. Malgraŭ tio esprimkapablo de la lingvo estas preskaŭ nelimigita, ĉar ties sintakso estis kun koncerna intenco kreita, nome per tipa normiga procedo ..."

**Nova gazeto pri lingva problemoj estas** — laŭ la usona faka gazeto Chemical and Engineering News — la monata revuo „Total Translation". Eldonas ĝin la kemia informa servo de la kanada firmao Fabian Chemical Company. La celo de la nova revuo estas „studo de ĉefaj obstakloj ĉe solvado de la lingva problemoj, analizado de antaŭaj klopodoj pri enkonduko de internaciaj lingvoj, informoj pri progreso tiurilata en diversaj fakoj kaj landoj, raportoj pri novaĵoj, libro-recenzoj kaj artikolresumoj ktp.". Jara abono kostas 25 dol., duonjara 15 dol. Adreso: Total Translation, P. O. Box

154, Sta G, Montreal 18, Que., Kanado.

**La germana popolo kaj la Unuiĝintaj Nacioj.** Eldonis Deutsche Liga für die Vereinten Nationen en Verlag Zeit im Bild, Dresden, 1967. 63 p. — Tre plaĉe presita broŝuro prezentas dokumentojn pri la eksterlanda politiko de Germana Demokratia Respubliko kaj ĝia preteco membriĝi al UNO. Tre salutinda eldonaĵo, kiu devus pli amase distribuiĝi ekster GDR. Unua oficiala esperantlingva eldonaĵo el GDR.

HALVELIK, Manuel: **Universala skribo.** (Antwerpen), eld. de aŭtoro 1966. 6, 128 p. Distribuejo: Sonorilo, Kerklaan 61, Brugge, Belgujo. Prezo 30 st. — La libro volas unue prezenti simboligan sistemon por diversaj lingvoj, due internacian normigitan regularon por reformi la skribmanieron de ĉiu ajn lingvo. La unua problemo estis kontentige solvita de la internacia fonetika transkripcia alfabeto; la alia problemo estas nun utopio. Tre malhelpas la legadon de multaj neologismoj kaj kontraŭfundamentaĵoj (ekz.: filjozofio, gelba, hierarŝa, synonyma, turismo). Mirinde, ke UEA ankaŭ akceptis la distribuadon de la libro.

SEKELJ, T.: **Hindujoj kaj la lingva problemo.** IOE-Gazeto, 1968 II/III, n-o 17/18, p. 5. — Prof. M. Pei (Columbia University, USA) korespondis kun Nehru — post apero de sia libro „Unu lingvo por la mondo” — pri uzo de Esperanto en Hindujo. — La saman preparolis T. Sekelj kun d-ro Radhakriŝnan. La ŝtata lingvo de Hindujo povas esti nur unu el la indiĝenaj lingvoj. La angla estas ankoraŭ uzata, kaj ĉiuj diplomatoj kaj oficistoj ĝin devas scipovi. La aziaj kaj afrikaj landoj verŝajne neniam iniciatos la enkondukon de Esperanto. Tamen ili sekvos la ekzemplon de Eŭropo. Jen tasko ankaŭ por ni.

TUINDER, Jacques: **Evoluhelpo kaj Esperanto.** IOE-Gazeto, 1968 II/III, n-o 17/18, p. 9. — La Internacia Federacio por Evoluhelpo „Carosi” en Wassenaar (Nederlando), okupiĝanta pri medicina helpo al evoluiĝantaj landoj, intencas sendi al Afriko surradan okulkuracejon (kun okulkuracisto kaj flegistino). Esperantistoj 25 000 guldenajn. (Duono estas jam kolektita.) La „kliniko de D-ro L. L. Zamenhof” estos praktika propagandilo de la Internacia Lingvo. La kampanjo nomiĝas Agado E3 (t. e. esperantistoj espenigas esperantojn). Adreso: Agado E3 Van Hulststraat 1. Ter Apel, Nederlando.

## EL NIAJ RONDETOJ

**LA 50-JARAN JUBILEON DE ĈEĤOSLOVAKIO LA ESPERANTISTOJ SOLENIS** per apartaj aranĝoj aŭ en la kadro de la klubaj kunvenoj. E-klubo en Brno donacis Kčs 200.— al la fonduso de la Respubliko.

**Esperantista Klubo en Prago** kunvenadas ĉiulunde je la 19-a horo en la klubejo Praha 1, Řeznická 17. Por la 14-a de oktobro estis anoncita prelego de la honora prezidanto Jaroslav Šustr pri vojaĝimpresoj el Hispanio; por la 21-a de okt. prelego

de la nova kluba prezidanto Prof. D-ro R. Horský pri „Lando plena de belaĵoj" (kun lumbildoj); por la 19-a de oktobro kluba ekskurso al la urbo Mělník por partopreni la tradician Renkontiĝon de esperantistoj de Centra- kaj Norda Regionoj de Bohemio. (Adreso: Klub esperantistů, Praha 1, pošt. schránka 1096.)

**Esperanto-rondeto de Ferfabrikoj en Třinec**, Moravio okazigis la 28-an de junio kulturan vesperon. Venonttage sekvis la tradicia ekskurso al la monto Čantoria en Beskidoj.

**Foiroj kaj Ekspozicioj en Brno** eldonis trikoloran ilustritan prospekton en formato A/4 pri la 10-a Internacia Foiro, okazinta en Brno la 8-17. de septembro 1968, en kunlaboro kun E-Klubo en Brno.

**VSETÍN**, centro de Moravio-Valaĥio, kun esperantlingva enmetaĵo, ilustrita faldprospekto ricevebla por Kĉs 1,— Interesiĝantoj skribu al Aleš Berka, Na hrázi 1423, Vsetín, Moravio. Eldoninto: Kultura Komisio de Urba Nacia Komitato.

**PODĚBRADY**. La invitilo al la junia esperantista renkontiĝo kaj 3-a Internacia Ŝakturniro (kun jarkunveno de Medicina Sekcio de ĈSEK), por soleni la 60-an datrevenom de la fondo de la mondfama banloko, enhavis ankaŭ „Mallongan historion de Poděbrady". Imitinda ekzemplo!

**Kroměříž**, nova ilustrita faldprospekto. Eldonis Distrikta Komisio por Turismo. Kun ĝojo ni konstatas la pliboniĝon de la lingvaĵo.

**Esperanto-rondeto en Příbor**, ĉe Klubo de laboruloj, zorgas pri la memorŝtono de Theodoro Čejka, ĉeĥa Esperanto-pioniro, studinta en la urbo. Estas fondata junulara fako en la skolta organizaĵo „Junák" (Junulo). S-ano Ant. Sattek gvidas kurson en la Baza 9-jara Lernejo, kie li aranĝis ekspozicion de ABC-libroj de eŭropaj nacioj (rezulton de multjara kolektado). „La Praktiko" en sia 3-a n-ro 1968 aperigis la artikolon de s. Sattek pri „Sorĉisto de mano". Li sendis por aperigo (verŝajne en la Scienca Revuo) la tradukon de la populariga artikolo de D-ro Jerman el Prago pri la kuracado de karcinomo. La Loka Nacia Komitato eldonis ilustritajn poŝtkartojn kun esperantlingvaj tekstoj. Al la 28-a de oktobro aperis broŝuro pri la urbo Příbor kun esperantlingva resumo.

**Habla Suiza — Ici la Suisse**. Elsendoj por Eŭropo: esperantlingve ĵaŭde kaj sabate je la 22,50 de MET, sur la ondolongo 31,46, 48,60 m.

**Nordvjetnamiaj Krokizoj** kolekto de militaj desegnaĵoj kun enkondukoj en Esperanta, germana kaj rusa lingvoj. Eldonis Fremdlingva eldonejo en Hanojo.

**12-jaraj interveno kaj agreso de la Usonaj imperiistoj en Laoso**. Eldonejo: Neo Lao Haksat.

**Pacon en Vjetnamio.** Eldonejo: Esperanta buroo por Paco en Vjetnamio, ĉe KLEK, Nakata-hamadori 3— 10, OYodo-ku, OSAKA, Japanio, n-ro 1/1968.

„**Esperanta Finnlando**“, la organo de la Esperanto-Asocio de Finnlando, aperas ekde 1968 en pli plaĉa vesto: ĝi estas presata ofsete, kio ebligas bonajn bildojn, variajn litertipojn kaj — moderajn kostojn. La formato restas la sama, DIN A5, n-o 1 havas 16 paĝojn, n-o 2 kiel antaŭe 8 paĝojn. Aperas 9foje jare. Abono eksterlanda kostas 6 mk (15 irk). — Esperanto-Asocio de Finnlando havas laŭ Jarlibro de UEA 1968 nur 245 membrojn.

**Esperanto estas uzata en la itala fervoja horaro**, nome en ĝia klariga parto, iriformas IOE-Gazeto, 1968, n-o 17/18, p. 17.

**En Budapeŝto funkcias Esperanto-restoracio**, nome ĉe Népszínház-u-30 (malantaŭ la teatro Erkel) en Buda-pest VIII. Menukartoj en Esperanto. (Rim. de la red.: S-ano Karel Jánký el Příbor sciigis nin, ke li skribis al la red. de Rudé Právo en Prago, kiu promesis cedi lian proponon al Turisma Komisiono de Urba Nacia Komitato, sed laŭ la opinio de R. P. la kono de Esp. ne estas ĉe ni tiel disvastigita kiel evidente en Hungario, do verŝajne ne estos eble varbi okupitaron.)

**Legu, abonu, rekomendu nian gazeton; subtenu ĝin per mondonacoj!**

„**INTERESA LEGAĴO**“ estas la titolo de la presita internacia legolibro, kies eldonon anoncis Esperanto-rondeto en Vsetín, Moravio. Ĝi ampleksas 124 paĝojn kaj (sen afranko) kostos Kčs 13,80. Lingve kontrolis J. Kořínek. Mendu ĉe s-ano Aleš Berka, Vsetín, Na hrázi 1423.

**Domo de Sindikatoj en Žilina-Hliny, Ĉeĥoslovakio** petas la tutmondajn esperantistojn pri alsendo de bildkartoj pri siaj urboj. La materialo estos uzata por granda ekspozicio. Ĉiu donacanto ricevos bildkarton, reprezentanta la Domon de Sindikatoj en Žilina. Pri efika kunlaboro petas Esperanto-rondeto ĉe Domo de Sindikatoj en Žilina por povi montri al la funkciuloj kaj loĝantaro la utilecon kaj praktikecon de la Lingvo Internacia.

**D-ro Tomáš Pumpr el Prago** post la dua operacio, necesa pro la frakturo de femurkolo post glitfalo en Pardubice dum la decembra plenkunsido de ĈSEK, estas kuracata en la Slovaka banurbo Piešťany. Al la kara paciento ni deziras resaniĝon.

**Aŭstria Esperanto-skisemajnoj 1969**

La 9a kaj la 10a - jubilea - internaciaj fervojistaj Esperanto-skisemajnoj (IFES) okazos inter la 15. II. kaj 22. II. kaj 1. III. 1969. en la montara regiono de Werfenweg apud Bischofshofen (inter Salzburg kaj Zell am See).

La varia programo (skiado, skikonkuroj; prelegoj, lumbildoj kaj filmoj, lingva konkuro, ŝercado ktp.) allogis ĉiujare la gesamideanojn en aĝo de 16 ĝis 81 jaroj el diversaj landoj. Ĉiu esperantisto rajtas partopreni la aranĝon, precipe la venontjara

aranĝo fariĝos ege rekomendinda, jam pro la favora prezo.

Informoj kaj aliĝiloj ĉe la perantoj; por Francio: -s-ino Josette Bernier, 190 bis Av. de Clichy, Esc. 3, 75 Paris 17e; por Germanio: s-ro Günther Doliwa, 3031 Cordengen No, 16: aŭ rekte "ĉe la organizanto: s-ano Johann Geroldinger, Marcusgang 7, A-4020, LINZ, Aŭstrio.

**CAKA VÁS ESPERANTSKÁ JAR 1969 VO VYSOKYCH TATRÁCH!!!**

Slov. esperantský ústav (adr.: Esperanto, poŝtkesto 80, MARTIN, Slov.), V spolupráci s podtatranskými esp. klubmi usporiada 1-tyidňový rekreačný pobyt v Tatranskom Ždiari, vo vile Protežka pre 35 osob. Cena pobytu Kčs 400.—. Pošlite hned záväznú prihlášku, ktorá je platná len pri zaplacení poplatku za ubytovanie, stravu 4 X denne, techn. vedúceho a našu réžiu. Nemeškajte, pomôžte esperantu trvale zakotvit vo V. T., dejisku Medzinár. lyžiarskych pretckov FIS 1970. (Pri nedostatku prihlášok odvoláme.)

53. svetový kongres UEA v Madridu (3.-10. 8. 68)

Žádost ČSEV o vyslání oficiální 2-členné delegace ČSEV byla pro nedostatek devizových prostředků zamítnuta. Proto předsednictvo pověřilo jako oficiálního zástupce ČSEV s. Mikuláše Nevana, delegáta SM na kongres TEJO v Tarragoně.

ZPRÁVY ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU – INFORMOJ DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO - KOMITATO. – Vydává – Eldonas: Osvětový ústav v Praze, Blanická 4, Praha 2. Rediguje – Redaktas: Dr. L. Izák – s redakčním výborem – kun la redakta komitato: J. Cíhová, Ing. Ed. Felix, Zd. Hršel. O. Kníchal, M. Lukáš, Dr. T. Pumpr, ing. Fr. Sviták, Ed. V. Tvarožek, J. Vondroušek. Tisk – Preso: Tlačiarne Slov. nár. povstania, Martin RM/39 – 67/KS NVP

# ČES Provolání

přípravného výboru Českého esperantského svazu  
ke všem esperantistům v českých zemích

Váženi přátelé,

dne 27. ledna 1969 zástupci přípravného výboru ČES slavnostně převzali stanovy Českého esperantského svazu. Tímto aktem vyvrcholila naše dlouholetá tužba a úsilí o obnovení vlastní samostatné organizace.

Naším úkolem je provést co nejdříve všechny přípravy k

**USTAVUJÍCÍMU SJEZDU**

který svoláváme na dny 29. - 30. března 1969 do Brna.

Chceme spolu s delegáty vámi zvolenými projednat hlavní úkoly svazové činnosti v nové etapě našeho esperantského hnutí a demokraticky zvolit vrcholné orgány svazu.

Očekáváme, že v rámci nového svazu rozvinou svou iniciativu, schopnosti a obětavost všichni členové esperantských klubů a kroužků, odborných sekcí i jednotlivců dosud stojících stranou.

Zveme vás srdečně k účasti na ustavujícím sjezdu jako zvolené delegáty i jako hosty.

#### MÍSTNÍ SJEZDOVÝ VÝBOR

Botanická 31, Brno

Josef Vondroušek

Zdeněk Hršel

#### PŘÍPRAVNÝ VÝBOR ČES

Blanická 4, Praha 2

Jaroslav Mařík

ing. František Sviták